Tiu telegramo donis al mi tre malfacilan taskon. Speciale dum la milito estas multaj malfacilaĵoj. Pri tempo... pri mono... pri materialo... Metaloj, papero, pli alta kosto, ktp, ktp... Supersignitaj presliteroj estas faritaj de metalo — kaj — kaj — ve estas mi! Sed mi havas la plej gravan detalaĵon por la redaktado kaj eldonado de la gazeto — *unanimeco*. Dankon, sinceran dankon al la Estra Komitato, kaj ankaŭ al la granda esperantistaro kiuj fidis en mia kapablo por redakti nian gazeton. Mi esperas daŭre meriti vian fidon. Mi faros laŭ la eblecoj.

## ANTAŬAJ REDAKTISTOJ...

En pasintaj jaroj redaktis multaj kuraĝaj kaj tre bonaj redaktistoj por *Amerika Esperantisto*. La du lastaj antaŭ ol mi ekprenis la laboron, pro siaj bonegaj laboroj, donas al mi tre altan ekzemplon por sekvi. S-ino Mabelle Davis tiel bone kaj sindoneme laboregis por levi la kvaliton kaj aspekton de la gazeto. Ni ŝuldas multon al ŝi. Kaj S-ro Joseph Leahy tiel mirinde savis la aferon en pasintaj jaroj. Tute senzorge me pri liaj kapitalo, sano, tempo, aŭ aliaj propraj interesoj, li faris la miraklojn kiuj konservis la organizon. Kiel la Roko Gibraltaro li portis tre pezan ŝar-

ĝon dum multaj jaroj. Oni iam diris pri li: "li ĉiam havas la piedojn sur la tero kaj pensas siajn proprajn pensojn, krome nek flatado nek minacado povas ŝanceligi lin."

Mi petas ke ĉiuj membroj forte subtenu nin — sendu artikolojn, ne forgesantaj pri la novaĵo pri grupoj. Varbu, varbu, varbu, por abonoj kaj kotizoj. *Unanime* ni povos atingi la venkon!

## MIAJ KUNREDAKTISTOJ...

Mallonge nun. Ni, la redaktistaro, prezentos nin per laboroj kaj artikoloj. Mi elektis jene por la komenco: D-ro W. Solzbacher, vaste konata en Esperantolando kiel sperta redaktisto de Esperanto-gazetoj en Eŭropo. Kiel bonŝance por ni ke li tiel sindoneme donas tiom multe el liaj multokupitaj tagoj! Kaj S-ro Leahy, Ĝenerala Sekretario, kiu pro sperto kaj ofico multe donacas al la afero. Mia edzino, Doris Tappan Connor, kiu estas grava verkisto, instruisto, kaj paroladisto en sia propra rajto. Kaj S-ino Pauline Knight, relative nova Esperantistino, sed jam nun unu el la plej aktivaj kaj praktikaj Esperantistoj en Usono. Aliaj multe helpas al la redaktistaro: Pastro Johano B. Kao. Ernest G. Dodge, Profesoro Mario A. Pei. Dr. H. Harris, ktp, ktp. *Ek al la laboro.*



# The Esperanto Association of North America

## EXECUTIVE COMMITTEE

Dr. Cecil Stockard, President Joseph Leahy, Gen. Sec'y, Armin F. Doneis, Member

---

### LETERO DE LA PREZIDANTO

After an unavoidable delay we begin another volume of *Amerika Esperantisto*. Last year we started in a new dress and a new home. Mrs. Davis made us proud of our magazine. In its new dress it attracted an increasing number of subscribers, including many Public and University Libraries. Now conditions over which the Estrá Komitato had no control have made it seem advisable to make another change. Our new editor, G. Alan Connor of New York City, is well known in Esperanto circles as an ardent worker for *la afero*. He has organized several *karavanoj*, in years gone by, to visit International Esperanto Congresses in Europe. Also he has visited Brazil and is well known among the Esperantists of South America, and at the present time is doing splendid work among the Latin Americans of New York City.

Below is a statement by Mr. Connor which assures all our members that *Amerika Esperantisto* will not be used to support anyone or anything except Esperanto. It is felt that such an agreement of purpose and promise of cooperation will be useful in facilitating the work of E. A. N. A.

Let me urge each and every Esperantist in North America to support E. A. N. A., its Executive Committee and its official organ, *Amerika Esperantisto*, its editor and his co-workers, to the fullest extent of his ability.

CECIL STOCKARD

### NEK POR NEK KONTRAU IU AU IO FROM ESPERANTO

The purpose and policy of "American Esperantist" shall be to promote Esperanto, and in everything else strict neutrality shall be observed.

As the official organ of the Esperanto Association of North America, the "American Esperantist" shall be guided by the statement of objects in the Certificate of Incorporation of E. A. N. A., viz., "The particular business and objects of the said association shall be the furtherance of the study and use of Esperanto, the International Auxiliary Language."

(Signed) G. ALAN CONNOR

# AVENTUROJ EN LA MILITO KUN KAJ SEN LA VERDA STELO

W. SOLZBACHER

“Se ili pafas, tenu vian kapon sub la akvo!” Kun tiu lasta konsilo mia franca amiko adiaŭis min. Li estis sukcesa agento de tiu “subtera fervojo”, kiu helpis personojn, kies vivo estis en danĝero, atingi la neokupitan parton de Francujo.

Mi naĝis bone. La germanaj patroloj ne pafis, ĉar ili feliĉe ne vidis min. Elirinte el la rivero Cher mi estis ekster danĝero, almenaŭ relative. Mi preskaŭ petole salutis la kamparanojn survoje. La unua domo, kiun mi vidis enirante vilaĝon, estis lernejo, kaj ĝi ankoraŭ portis, malgraŭ la ordonoj de la Vichy-registaro, la surskribon “Libereco, Egaleco, Frateco”. Kun preskaŭ religia fervoro mi murmuris tiujn vortojn post la monatoj travivitaj sub la tiraneco de la Hitleraj mondkonkerantoj.

Du tagojn poste mi retrovis mian edzinon kaj miajn infanojn kaj havis provizoran, sed ne tute sendanĝeran, havenon. Mi komencis skribi leterojn al tiu sola libera lando, kiu estis facile atingebla de la malfeliĉa Francujo de 1940: Svisujo. Unu letero iris al Universala Esperanto Asocio, Palais Wilson, Ĝenevo. Mi skribis en franca lingvo kaj en tre singardema stilo, ĉar mi timis la riskojn de la cenzuro.

Post unu semajno, respondo venis en Esperanto. Samideano Hans Jakob skribis, ke samtempe li sendas kvincent frankojn el la modesta kapitalo de Esperantista Interhelpo por nia vojaĝo al Lisbono (Lisboa) kaj ke li deziras al ni feliĉan vojaĝon. La letero ankaŭ enhavis multajn novaĵojn, bonajn kaj malbonajn, pri samideanoj diverslandaj: A, B kaj C mortintaj aŭ mortigitaj, L kaj M en malliberejo aŭ koncentrejo, R kaj S malaperintaj, T kaj U internitaj en Suda Francujo. La unuaj novaĵoj pri la familio Zamenhof estis ĵus alvenintaj en Ĝenevo, kaj laboro komencis por sendi manĝaĵojn kaj helpi F-inon Lydia Zamenhof foriri de Polujo kaj atingi tiun fabelan paradizon trans la oceano, kiu nomiĝas Ameriko, kaj pri kiu miloj da mizeruloj kaj persekutatoj revis en la infero de la eŭropa milito.

En tiu momento mi ankoraŭ ne sciis, kiom da malfacilaĵoj ankoraŭ atendis min kaj mian familion kaj ke mi restos ankoraŭ tutan jaron en la danĝera nebulo de vagabunda vivo, kiu povis finiĝi iun momenton per katastrofo aŭ per savo. La katastrofo ŝajnis preskaŭ ĉiam havi la pli grandan ŝancon, sed fine nia bona stelo estis pli forta ol la dia-

bloj de la milito kaj la ruzoj de la Gestapo.

Kiel foriri el Francujo sen paperoj aŭ kun nesufiĉaj paperoj? Mi aŭdis, ke svisa agentejo organizis aŭtobusajn vojaĝojn de Ĝenevo al Barcelono, kaj ŝajnis ke la aŭtobusoj pasus ne malproksime de la loko kie ni estis. Mi longe korespondadis pri la afero kun Hans Jakob, kaj li traktis kun la agentejo. Esperanto estis bela ilo por eviti la danĝerojn de la cenzuro. Esperanto, kun ĝia genia sistemo de prefiksoj kaj sufiksoj ebligas aludojn tiel delikatajn ke cenzuristo, eĉ se li scias Esperanton, ne facile eltrovas la kaŝitan sencon. En mia izolita situacio, Esperanto ankaŭ malfermis al mi fenestron al la libera mondo.

Unu tagon venis intereseĝa informo: Svisa firmo intencis organizi servon de malgrandaj ŝipoj, kiuj irus de la sudfranca haveno Sete rekte al Lisbono, vojaĝante ĉirkaŭ la hispana duoninsulo. Du tagojn poste mi diskutis la aferon kun mia amiko John. John estis angla soldato. kiu en junio, 1940, subite troviĝis malantaŭ la germanaj linioj. Francaj kamparanoj kaŝis lin kaj donis al li civilajn vestojn, kaj post kelkaj malfacilaj monatoj li sukcesis, simile kiel mi, atingi la "liberan" parton de Francujo. Li serĉis iun manieron por iri al Gibraltaro. Do li irus al Sete kaj vidus kiel la mistera ŝiplinio funkcius. Nova letero el Ĝenevo

informis min baldaŭ ke "nesupereblaj malfacilaĵoj" mortigis la projektan de la ŝiplinio. Kaj amiko de John skribis al mi ke lia unua klopodo malsukcesis, sed ke li preparas duan, per alia metodo.

Venis ankaŭ leteroj el Ĝenevo pri Esperantistoj, kiuj troviĝis mizere kaj malsate en francaj internejoj, ekzemple la kataluna samideano Jaume Grau Casas, poeto, organizinto de la Internaciaj Esperantistaj Florludoj kaj kompilinto de la admirinda "Kataluna Antologio", kaj la Viena Esperantista verkisto kaj tradukisto Bernhard Selzer (nun en Usono). Mia edzino kaj mi helpis sendi kaj sendigi al ili pakaĵojn kun manĝaĵoj, speciale pano, kaj mia edzino almozpetis nutraĵmarkojn por tio, de najbaroj. Mi ankaŭ donis utilajn konsilojn por la vojaĝo de Hans Jakob, direktoro de UEA kaj Esperantista Interhelpo, al Francujo, kie li vizitis kaj organizis pluan helpon al internitaj samideanoj.

Kiel mi ĝojis aŭdi ke en Lyon okazis sukcesa Esperantista kunveno okaze de la Foiro kaj ke alvoko farita favore al Esperantistaj militviktimoj ne nur rezultigis kolekton de mono, sed ankaŭ de nutraĵmarkoj, nun pli valoraj ol mono en multaj landoj. Mi ne povis ĉeesti tiun kunvenon, sed mi ĉeestis kelkajn Esperanto-kunvenojn en Marseille kaj renkontis multajn gesamideanojn.

(al paĝo 22)

## “HEROLDO DE ĈINIO”

---

La nuna mondmilito, kaŭzata de la imperialisma ambicio unue de la Japanaj militistoj kaj poste de la Nazi-faŝistoj, ne nur detruis sennombrajn urbojn kaj urbetojn kun iliaj belaj monumentoj, temploj, muzeoj, kaj kulturaj centroj en la militafliktitaj landoj kiel Ĉinujo kaj Eŭropo, sed ankaŭ ĉesigis aŭ malhelpis ĉiujnpacajn movadojn de la homa kulturo, kiel nian movadon de la universala lingvo Esperanto.

Nia movado floris en Eŭropo antaŭ la milito, kaj ĝi progresis ankaŭ en Ĉinujo. Sed ve! la milito eksplodis. La perforto regas. La imperialistaj krimuloj ne amas la organizojn, kiuj celas al la paco kaj fratiĝo de la homaro, ĉar ili ne amas la pacon sed volas konkeri kaj slavigi aliajn popolojn. Sekve sub la piedpremo de la militfieraj barbaroj, la Esperanto movado suferas: multaj adeptoj estis mortigitaj, aliaj disigitaj, kelkdekoj da gazetoj en aŭ pri Esperanto malaperis, la organizoj disiĝis, en diversaj malfeliĉaj landoj de Eŭropo.

La movado sammaniere suferis en Ĉinujo pro la Japana invado. La Esperanto societoj disiĝis, la agadoj haltis, la gazetoj malaperis en la teritorio okupata de la invadantoj.

Tamen niaj ĉinaj samideanoj, klopodadis, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj depost la komenco de la

milito, ne nur savi la movadon el la kompleta pereco, sed ankaŭ plivigliĝi ĝin en la Libera Ĉinujo. Fakte, ili publikigis librojn kaj propagandilojn en aŭ pri Esperanto, kaj ili fondis novajn gazetojn en Esperanto, por uzi nian karan kaj belan lingvon kiel efikan instrumenton por la defendo de la justeco kaj homa digno kaj libero. La precipaj el tiuj gazetoj estas jenaj: “Voĉoj el Oriento”, duonmonata, kun ĉina titolo skribita de la Prezidanto de la Ĉina Respubliko, S-ro Lin-Sen. kiu mortis en Septembro de la pasinta jaro. La aŭtografo de la Prezidanto por tiu gazeto montras ke oni multestimas la valoron de Esperanto je la servo de la nacia defendo kontraŭ imperialista atako. Kaj “Orienta Kuriero”, monata eldonaĵo. Tiuj du gazetoj publikigis en Hongkong. sed pro la grava ŝanĝo de la politika situacio en la Oriento, ili ambaŭ devis ĉesiĝi en 1941.

Hodiaŭ la nunsola Esperanta gazeto en Ĉinujo estas “Heroldo de Ĉinio”. Ĝi ekaperis en 1939 en Chungking, la milittempa ĉefurbo de Ĉinujo. Unue ĝi estis duonmonata, sed monata depost 1942. Ĝia papero ne estas bonkvalita pro la militaj kondiĉoj kaj malfacilaĵoj. Sed ĝia enhavo estas tre interesa kaj ĝiaj artikoloj bone verkitaĵoj. Oni povas elĉerpi multajn valorajn aktualajn informojn pri la vivo kaj batalo

de la milittempa Ĉinujo. Ĝi estas ilustrata per multaj belaj lignogravuroj.

La samideanoj, kiuj direktas tiun gazeton, faras heroan klopodon, ĉar la kosto de la taga vivo nun estas terure alta en Ĉinujo; la papero mankas, la poŝta komunikado ne estas facila, precipe al fremdlandoj. Oni nur povas sendi la gazeton al la fremdaj landoj en la leterformo kaj per aerpoŝto trans la altaj montoj de la Himalaja, Kelkaj monatoj estas necesaj por la transporto de la gazeto el Chungking al Usono. La sendkosto de unu ekzemplero estas pli ol dek ĉinaj dolaroj. Spite de ĉiuj malfacilaĵoj, la samideanoj en Chungking klopodas daŭrigi la eldonon de la gazeto, ĉar ĝi simbolas la vivon de nia movado en Ĉinujo. Mi esperas ke niaj samideanoj en Usono komprenu la gravecon de la movado en Ĉinujo kaj montru simpatian al la ĉinaj samideanoj. subtenante tiun gazeton per abono aŭ libervola donaco. La adreso de "Heroldo de Ĉinio" estas jena:

P. O. Box 175, Chungking, China.

Pastro Johano Baptisto Kao  
la 30-an de Marto, 1944  
Nov-Jorko

## KVAZAŬ EN IZOLITA INSULO

—  
"Heroldo de Ĉinio"  
P. O. Box No. 175  
Chungking, China  
Junio 30, 1943

Estimata S-ano Redaktoro:

Ni ĉinaj esperantistoj kvazaŭ vivas en izolita insulo informigante pri nenio de la vasta mondo esperanta. Tamen ni obstine kulturas nian verdan kampon kaj senlace laboras per nia lingvo por nia komuna tasko kontraŭ la barbarisma faŝismo. Malforta estas nia forto, sed fera estas nia volo por la vero. Ni forte esperas ke niaj eksterlandaj samideanoj ne forgesu siajn samlingvanojn en Ĉinio, kaj ke vi sendu al ili de tempo al tempo leteron, eldonaĵon en Esperanto, kiuj tre necesas por ili, ĝuste kiel municioj por armeo en milito. . . .

Esperante ricevi viajn leteron kaj gazeton kaj kun ĉiuj bondeziroj kaj antiinvadaj salutoj ni restas

Sincere via  
HEROLD DE ĈINIO  
per SANIO

*Pesimisto kaj Optimisto* estas du muŝoj. Ili ambaŭ falis en glason da lakto. Pesimisto nenion faris por savi sin, kaj dronis. Optimisto naĝadis — kaj naĝadis — ĝis la batado de ĝiaj kruroj faris bulon da butero. Li sidiĝis sur la butero, sekiĝis kaj forflugis.

## ESPERANTISTOJ EN KAJ EKSTER LA ARMEO

*Leŭtenanto Charles E. Simon*, antaŭa Vic-Prezidanto de EANA, kaj pactempa loĝanto de Klevelando, raportas pri la vikleco de Esperanto-agado en Britujo. Li vizitadis inter la societoj kaj organizoj precipe en la ĉirkaŭaĵo de Londono. Leŭt. Simon jam faris paroladojn antaŭ la ĉefaj kluboj en Londono, Birminhamo, k. t. p.

\* \* \*

*D-ro Félix Martí Ibáñez*, mondvaste konata inter la hispanlingvanoj kiuj laboras por la plena liberigo de Hispanujo, estas granda amiko de Esperanto. Li verkis fervoran artikolon en "*España Libre*", la ĵurnalo de la Societades Hispanas Confederadas de los Estados Unidos de America, pri Esperanto kaj la nova hispana grupo, *Esperantistas Hispánicos de Nueva York*. Lastatempe tiu grupo sub la direktado de *Floreal Conchado*, celebris grandan Feston kaj Dancon, en Nov-Jorko la 27an de Februaro.

\* \* \*

*Kaporalo Davido Jagerman*, fervora propagandisto de Esperanto inter siaj kunsoldatoj, nun troviĝas ie en Nord-Afriko.

\* \* \*

*Floreal Conchado*, estro de la Esperantistoj Hispanaj de Nov-Jorko, raportas plian subtenon por Esperanto de D-ro Martí Ibáñez. Gratulante la societon pro la bonega Esperanto-Festo, D-ro Ibáñez skribis ke la sukceso

de la Festo antaŭsignas bonan progresadon por Esperanto en Usono. Kaj, "Mi ankaŭ promesas al vi, ke mi daŭrigos mian helpon kun entuziasmo kaj simpatio al la idealo de Esperantismo."

★ ★ ★

*S-ro Fritz Uhlig*, de Bruklino. Nov-Jorko, verkis bonegan artikolon pri Esperanto en "*Solidarity*", oficiala organo de la Workmen's Benefit Fund de Usono. Krom la informo pri Esperanto li sciigis pri diversaj Delegitoj kiuj provizos instruadon de Esperanto.

\* \* \*

*Rachel E. Edwards*, Urbana. Illinois, raportas pri vespero de internacia lingvo, je la 5-a de Marto, ĉe kunveno de la Baha organizo. Si donis duon-horan paroladon pri Esperanto, kaj diversaj ĉeestantoj esprimis la deziron por lerni la interlingvon.

---

### SPECIAL OFFER

*For a limited time, to introduce the new*  
**"American Esperantist"**

with augmented Editorial Staff and vital news about language and interlanguage from every corner of the globe. *For each new subscription (or renewal now); a copy of the model Esperanto booklet: "Esperantismo" by I. Gomes Braga* (Printed in Brazil)

### FREE AND POSTPAID TO YOU

We make this offer to encourage new readers to secure all important current numbers of "A. E."

Send \$1 for each subscription, ask for the booklet "Esperantismo."  
(With EANA membership — \$2)

**THE AMERICAN ESPERANTIST**  
114 WEST 16TH STREET  
NEW YORK, 11, N. Y.

---

## LINGVUMADO DE E. LANTI

Ĉu Esperanto estas belsona? Iafaĵe oni demandas nin. Antaŭ multaj jaroj, mi mem estus tre embarasata, por respondi sincere tiun demandon. En la komenco de mia Esperantista vivo ja sieĝis min naŭza sento, kiam mi aŭdis la sonon *ĉu*.

Klarigcele mi diru, ke en la regiono, kie mi naskiĝis kaj vivis ĝis mia dek-oka jaro, la kamparanoj diras: “*ĉu!...ĉu!...*”, kiam ili forpelas porkojn. Tial, komence, Esperanto ŝajnis al mi nelerninda lingvaĉo porkpensiga. Kaj tiam, por daŭrigi la lernadon, necesis, ke mia racio forte bremsu mian malsimpaton al la *ĉu*-a Zamenhofaĵo.

Kelkaj jaroj forpasis, dum kiuj mi ne tute sukcesis liberiĝi je mia malesperantemo. Nu, en 1921, mi havis la okazon, en Dresdono, Germanujo, konatiĝi kun juna fraŭlino, kiu preskaŭ manie uzadis la konjunkcion *ĉu*. Kiam, ekzemple, mi diris: “Estas al mi tre agrable promeni kun vi...”, tiam ŝi respondis: “Ĉu...?” Kaj tiel same ĉe la fino de multaj el miaj paroloj.

Unuafoje mi ricevis la impreson, ke ŝi volis forpeli min, kiel porkon. Sed, rigardante en ŝiajn okulojn, mi tuj konvinkiĝis pri mia eraro. Baldaŭ mi ne plu pensis pri porkoj, kiam mi aŭdis: *ĉu?* el la buŝo de la aminda Dresdenanino bluokula. Kaj dank’

al ŝi Esperanto ĉesis esti por mi porkpensiga...

Deknaŭ jaroj forpasis kaj mi fariĝis ĝismedola esperantisto. kiu kvazaŭ *sentas* la signifon de *aĉ*. Nu, mia migremo puŝis min en hispanlingvajn landojn, kaj mi do havis ofte la okazon aŭdi la vortojn “*muchacho*” (muĉaĉo, knabo) kaj “*muchacha*” (muĉaĉa, knabino). Tial komence, mi pensis, ke la lingvo de Cervantes estas malbelsona, vere aĉa kaj nelerninda. Sed forpasis preskaŭ kvin jaroj, de kiam mi ĉiutage aŭdas la vortojn “*muchacho*” kaj “*muchacha*” kaj mi devas konfesi, ke ili ne plu tiklas malagrabla mian aŭdorganon.

El tiuj kaj similaj konstatoj mi alvenis al la konkludo, ke bel- aŭ malbelsoneco de lingvo estas afero pure subjektiva, kiu, por la plimulto, varias laŭ latitudoj.

Per miaj oreloj, la plej malbelsona lingvo, el ĉiuj kiujn mi aŭdis ĝis nun, estas la angla. Kiam mi aŭdas paroli angle, tiam mi ricevas la impreson de siblado kaj kraĉado. Sed mi neniel dubas, ke se mi naskiĝus kaj edukiĝus en London, la lingvo, kiun parolas lia reĝa moŝto de Britio, imperiestro de Hindio kaj tiel plu, estus por miaj oreloj la plej melodia el ĉiuj kaj nepre indas esti trudata al la tuta mondo.

Pri ĉiuj aliaj lingvoj oni povas fari similajn rimarkojn.

*El “Renovigo”, Meksikurbo*

## ESPERANTO EN PORTUGALUJO

Samideano C. Isidoro de Jesus estas juna portugala maristo en la civila maristaro. S-ro Wm. Vathis instigis lin fari raporton pri nia movado en lia lando dum unu el liaj oftaj vizitoj al nia marbordo.

Estas ja ĉies kono, ke pro la nuna militego, ĉion furioze detruanta ĉe sia trapaso, la Esperanta movado en multaj landoj aŭ estas tute haltigita, aŭ tre malfacile vivetas. Rilate al mia lando, la afero estas iom alie.

Dank'al senĉesa laboro kaj sindonemo de kelkaj fervoraj Zamenhofanoj, nia lingvo sufiĉe kontentige floradas. Precipe en Lisbono, oni renkontas sur la stratoj ĉiam novajn Esperantistojn; ĉiam novajn vizaĝojn kies posedantoj fiere portas sur siaj brustoj la verdan emblemon de la espero. Ili estas plejparte junaj entuziasmaj samideanoj, kies mienoj elsignas la plezuron sinceran, kiun ili sentas dum ili parolas en nia lingvo. Inter la tramistoj oni trovas ofte Esperan-

tistojn; multaj fervojistoj uzas ankaŭ nian belan idiomon.

Esperantaj, publikaj societoj estas malpermesataj; tamen malgrandaj privataj rondetoj laboras kaj propagandas, kvankam kun malfacileco. Estas menciinda ĉi tie, la nomo de Alberto Silva, kiu kun la helpo de aliaj konsciaj samideanoj, estigis senpagan, perleteran kurson kiu rapide akiris multajn lernantojn en la tuta lando. Tiu kurso jam funkcias de antaŭ eble du jaroj. Ties sidejo estas en Lisbono, ĉe la supre menciita samideano.

En la urbo Porto, senlace laboras kaj aktive varbas por nia celo la samideano Manuel de Freitas. Lin ne timigas iaspecaj baroj. Per persisto kaj amo al nia afero, ĉion li venkas.

Generale, en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj, la movado progresas kaj pligrandiĝas, malgraŭ la malsimpatio kaj konsekvenca malhelpo de la aŭtoritatoj.

C. Isidoro de Jesus.

---

### AVENTUROJ EN LA MILITO

(de paĝo 17)

inter ili malnovajn amikojn kaj novajn — pri kiuj mi eble babilos en alia artikolo en “Amerika Esperantisto”.

Fine cirkonstancoj fariĝis pli favoraj al nia plano atingi liberan landon, kaj en aŭgusto, 1941.

ni forlasis Eŭropon de Sevilla (Hispanujo) sur la “infera ŝipo” Navemar. Post 38 tagoj surmare, kaj malgraŭ teruraj kondiĉoj kaj epidemio de intestfebroy, kiu preskaŭ mortigis min, ni finfine atingis Novjorkon kaj salutis el dankema koro la Statuon de Libereco.



# LA RENKONTO

Franca humoraĵo de ALPHONSE ALLAIS

*Alphonse Allais, franca literaturisto, 1854-1905, verkinto de multe ŝatitaj humoraĵoj.*

*Georges Auriol, franca literaturisto kaj desegnisto (1863) verkis humoraĵojn kaj distingigis en ornama arto.*

Antaŭ kelkaj jaroj, mia amiko Georges Auriol kaj mi, troviĝis sur la teraso de la Kafejo d'Har-court. Ni sidiĝis ĉe tablo najbara de alia, kie iu sinjoro trinkis glason da biero.

Ĉar estis varme, tiu ĉi sinjoro deprenis la ĉapelon kaj metis ĝin sur seĝo. Je la fundo de la ĉapelo, mia amiko Georges Auriol povis ekvidi la nomon kaj adreson de la ĉapelisto: P. Savigny, Rue du Marché, Tréville-sur-Meuse.

Kun seriozeco kiun li rezervas ekskluzive por tiaspecaj entreprenoj, Auriol fikse rigardis nian najbaron, poste diris tre ĝentile:

“Pardonu, Sinjoro, ĉu vi ne venas el Tréville-sur-Meuse?”

“Certe?” respondis la sinjoro, serĉante rememori pri Auriol.

“Ha!” diris tiu ĉi, “mi estis certa ne erari. Mi iras ofte en Tréville. Mi eĉ havas tie bonan amikon, kiun vi eble konas, iun Savigny, ĉapelisto, en la Rue du Marché.”

“Ĉu mi konas Savigny! . . . . Sed mi bonege konas lin! Vidu,

estas li kiu vendis al mi tiun ĉi ĉapelon.”

“Ha, vere?”

Ĉu mi konas Savigny! . . . . Ni konas unu la alian de kiam ni estis knaboj, ni iris en la saman lernejon, mi vokas lin Paŭlo, li vokas min Ernesto.”

Kaj Auriol ekparolis senfine kun la alia pri Tréville-sur-Meuse, loko kies nomon mia amiko Georges Auriol, eĉ ne konis antaŭ kvin minutoj.

Sed mi, ĵaluza pri la sukceso de mia kamarado, decidis pligrandigi lian malgrandan ŝercon kaj lin paligi pro envio. Rapida rigardo en la fundon de la fama ĉapelo rivelis al mi la ĉefliterojn de la nomo del' posedinto. Du minutoj pasigitaj apud la Bottin-Adresaro de la kafejo sufiĉis por konigi al mi la kompletan adreson de Sinjoro E. D. H.

*Komercistoj:* Duval-Housset. (Ernest) . . . . k. t. p.

Kun kvieta sinteno mi venis residiĝi kaj miavice fikse rigardante la sinjoron el Tréville mi diris:

“Senkulpigu, se mi eraras, Sinjoro, sed ĉu vi ne estas Sinjoro Duval-Housset, komercisto?”

“Tre vere, Sinjoro, mi estas Ernest Duval-Housset, via servanto.”

Certe Sinjoro Duval-Housset estis mirigita esti rekonata de du individuoj kiujn li neniam renkontis, sed estis ĉefe la mirego

de Auriol kiu estis preskaŭ freneza. Per kiu sorĉo mi do povis diveni la nomon kaj profesion de tiu ĉi komercisto de alkoholaĵoj?

Mi aldonis: “Ĉu estas ankoraŭ la patro Roux, kiu estas urbestro de Tréville?” (Mi rapide estis leginta en la adresaro tiun ĉi nomon: Urbestro: D-ro Roux, patro).

“Ve, oni enterigis la karan homon antaŭ tri monatoj.”

“Nu, nu, nu! Estis vere tre bona homo kaj plie, bonega kuracisto. Kiam mi grave malsaniĝis en Tréville, li kuracis min en malpli ol dekkvin tagoj.”

“Oni ne rapide anstataŭas tian viron!”

Auriol tamen fine divenis mian ruzaĵon li ankaŭ foriris, baldaŭ revenis kaj nia interparolado daŭrigis pri Tréville kaj ĝiaj loĝantoj.

Duval-Housset ne plu kredis siajn orelojn. “Mil tondroj!” li ekkriis. “Vi konas la loĝantojn de Tréville pli bone ol mi, kiu tie naskiĝis kaj kiu tie loĝas de 45 jaroj!”

Kaj ni daŭrigis: “Robert, la tranŝilfaristo, kiel li fartas? Kaj Durandeanu, ĉu li estas ankoraŭ bestkuracisto? Kaj Vidvino Ledebel? Ĉu estas ankoraŭ ŝi, kiu mastrumas la Hotelon de la Poŝto?”

Fine, la du folioj de la adresaro pri Tréville estis uzitaj (Auriol, moderna vandalo, estis akirinta ilin per lerta eltranĉo kaj malavare donis unu al mi).

Duval-Housset, feliĉege pagis al ni glasojn da biero —, ho, tre rapide trinkitaj! Ĉar estis varme (ĉu mi diris tion supre?) kaj nenio soifigas pli ol paroli pri urbo kiun oni neniam vidis.

La festeto finiĝis per bonega vespermanĝo kiun Duval-Housset oferis al ni. Oni trinkis je la sano de ĉiuj samurbanoj de nia nova amiko kaj vespere ĉirkaŭ meznokto, se iu estus pretendinta al Auriol kaj mi, ke ni ne estis amikoj kun la tuta loĝantaro de Tréville-sur-Meuse, tiu persono estus havinta tre malbonan akcepton.

— Trad. R. R.

*Soldato Joseph Milan*, nun en la armeo, sendas salutadon al ĉiuj samideanoj de Nov-Jorko. Li aktive subtenis Esperanton en la Regiono Nov-Jorko, kaj servis kiel IEL Delegito en Jerzio-Urbo, Nov-Jerzio. Kompreneble li laboras por la afero en la armeo.

*Soldato Ted Crawford*, ankaŭ armeano, sendas saluton al la usona samideanaro. Liaj faroj por la progreso de Esperanto estas tiom multe ke ni bezonus tutan numeron de *Amerika Esperantisto* se ni presus pri ili. Do, ni nur diras: “Brave!”

## ESPERANTO BOOKS

Uncertain transportation makes it difficult to get books from Europe or South America, and our orders are filled in small lots. If your order is not filled within 48 hours, it is because we are waiting for shipments.

### AMERICAN PUBLICATIONS — filled promptly

PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, by Ivy Kellerman-Reed. A favorite all over the world for many years. For class or self-instruction	.60c
ESPERANTO HOME STUDENT, by James Robbie. Splendid for class or self-study. Pocket size and a favorite with the service men in camps	.20c
PRACTICAL ESPERANTO, by Dr. Wm. S. Benson. For self-instruction. It is unique with its 650 illustrations	.25c
UNIVERSALA ESPERANTO METODO, by Dr. Wm. S. Benson. This book is a wonder. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Two full-page tables of the pronunciation of the Esperanto alphabet in 36 languages. Correlatives in 35 languages. Complete index. 555 pages	\$3.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, by Carl Froding. 80 pages of Esperanto-English and English-Esperanto. An indispensable little pocket companion	.30c
ESTU PRETA, by George J. Falgier. A splendid <i>key</i> , with grammar, and considerable fundamental teaching	.05c
FUN WITH ESPERANTO, by Prof. C. C. Bristol. Unique and interesting	.65c
THE ESPERANTO SONG "LA ESPERO". Words and Music. Double sheet 8 x 11. Every Esperantist should have it. Sung at all Esperanto meetings.	.15c or 2 for .25c

### BOOKS FROM OVER-SEAS

EDINBURGH DICTIONARY. A world favorite. English-Esperanto and Esperanto-English. 288 pages	.75c
STEP BY STEP IN ESPERANTO, by M. C. Butler. One of the world's best.	Paper covers .60c Cloth covers .75c
DICTIONARIES. Just received, a few copies of Millidge (\$3) and Fulcher & Long (\$2.50), with damaged covers — contents are OK. Will sell for 50c off price of either.	
STARS. No more of the metal stars, advertised in some text-books, due to priorities. We have a few of the INDIAN BEAD STARS, which are very popular, price each .45c	
No more HOME STUDENT RECORDS — made in Europe.	

### YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist", \$2.00 per year. And if you also wish membership in the International Esperanto League, with the *Jarlibro* (Yearbook Encyclopedia of Esperanto Activities), \$3.00. For the "Esperanto Internacia" (all-Esperanto official organ of I. E. L.) add \$1.00 to either of these memberships.

I ..... Date .....

apply for membership in the Esperanto Association of North America, and

enclose subscription (indicate class and amount) .....

.....  
 .....

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

1410 H St., N. W., Washington, 5, D. C.

Esperanto is the living interlanguage created for interchange of thought between peoples of different national languages—not to take the place of their mother tongues.

Dr. Mario Teixeira de Freitas, General Secretary of the Institute of Geography and Statistics, of the United States of Brazil, expresses the thought of many eminent scholars in both the Occident and Orient about 'cultural imperialism'. Note that Esperanto is the official auxiliary language in this Department of the Government of Brazil.

". . . We are demonstrating the best means for achieving a true and definitive fraternization of the American peoples, namely the adoption of the common auxiliary language, which can only be Esperanto. . . . The Institute already uses Esperanto, and more and more will put it to greater use, giving practical proof of its efficacy. . . .

"Through Esperanto we will realize unity and confraternity under the very best spiritual condition, because our endeavors in this respect will not bring about the subjection of any part of our populations to a biological and psychological creation of another group. Such a group, because of the use of its language throughout the continent among diverse peoples, would have superiority and would occupy a privileged position."